

Aŭstraliaj Esperantistoj



Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 12/03/2020 Kvarcentseksdeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **716,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **277,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **235,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **204,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro.111



La sufikso "-igi" funkcias por krei la Faktitivan Voĉon. En la komenco de § 368 P.A.G. diras, ""La signifo de IGI estas "fari -a aŭ fari ke io estu -a."" Tio ne estas ĝusta, ĉar la signifo estas "fari iun aŭ ion -i". Ekzemple "Ŝi igas la knabon nutri la kokinojn" = "Ŝi nutrigas la knabon" kaj "Ŝi nutrigas la kokinojn", kaj, Zamenhof'a, "Ŝi nutrigas la knabon la kokinojn".

Sed en § 119C P.A.G. kontraŭe, sed ĝuste, diras "La fundamenta senco de la Faktitivo estas "fari ke iu aŭ io faru aŭ suferu agon"". Ekzemple: "Ŝi nutrigas la knabon" kaj "Ŝi nutrigas la kokinojn". Tio estas ankaŭ la klarigo de Zamenhof. Li ekzemplas "Ŝi nutrigas la knabon" kaj "Ŝi nutrigas la kokinojn". Kun aliaj verboj tio povas kaŭzi miskomprenojn pri kiuj agas kaj kiuj suferas la agon. Proksimsemajne pri tio.

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

El Sidnejo. Esperanto Domo.



Karaj,

La 1an de marto okazis kunveno en la Esperanto-domo de Sidnejo. Ni havis specialan gaston el Kroatio: Damir Matasin kiu estas parenco de John Matasin dank' al kiu la federacio posedas Esperanto-domon. Damir donacis al la federacio tre belan libron pri la historio de la Esperanto-movado en Bjelovar, Kroatio.



Mi kunsendas foton. Damir estas la persono kiu staras inter Rainer kaj mi.

Amike, **Nicole Else**



La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo

atendos vin. La 7a de Marto estis la unua sabato de la monato.

Venis Roger kaj John. (Eĉ malgrandaj raportoĵoj estas bonvenaj.)

Roger Springer



El Adelajdo

La jarkunveno de la sudaŭstraliaj esperantistoj okazis la 4-an de marto 2020.

Reelektiĝis la ĝisnuna estraro: Trevor Steele - prezidanto, Sandor Horvath - vicprezidanto, Indrani Beharry-Lall - kasistino, Katja Steele - sekretariino, Benno Lang kaj Paul Desailly - estraranoj.

Oni decidis denove organizi Vintran Kursaron (en junio).

Post la oficialaĵoj Katja Steele prelegis pri la ĥemiaĵoj, kiuj enestas la manĝaĵojn aĉetitaj en manĝaĵbutikoj.

Katja Steele



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Konkurso pri poezio en Italio

Ĉi tiu konkurso atingis sian sesan fojon kaj de jaro al jaro ĝia famo fariĝis ĉiam pli granda. En ĝi estas ankaŭ speciala premio por la poemo, kiu temas pri sociala malkomforto kaj ĉia opreso kaj alia por la plej bela soneto.

Plue dum ĉi-jara fojo la partoprenantoj ricevos - kiam ĝi estos preta - la plenan verkaron de la konkurso.

<https://www.iconcorsidisamideano.it/poezio-el-ciuj-cieloj-sesa/>

Amike,

Katja Steele



DUOLINGO

Ho la ĝojoj de teknologio. Semajnon post semajno mi informiĝas en AE pri kiom da homoj lernas Esperanton per Duolingo. Finfine ankaŭ mi esploris. Kaj trovis plurajn dubetaĵojn, el kiuj jen kelkaj ekzemploj.

Lia granda ĉapelo: oni permesas *large hat* (jes) sed malpermesas *big hat* (ne).

He wears a hat: li portas - jes. Li surportas - ne. Laŭ mi, vi povas porti vian ĉapelon en via mano, sed vi surportas ĝin sur via kapo.

Koko tradukiĝas kiel *hen*, aŭ *chicken*!! Ĉu koko ne estas virseksa birdo? Ĉu kokino kaj kokido ne pli taŭgas por *hen* kaj *chicken*?

What colour is the car? Kiun koloron havas la aŭto? - jes. Kiukolora estas la au'to? - ne.

As big as you: tiel granda kiel vi - jes. Tiom granda kiom vi - ne.

Duolingo ankaŭ malpermesis esprimojn kiaj *is running* (*runs*), *am walking* (*walk*), *is going* (*goes*), k.t.p. Ŝatas manĝi fragojn: *likes to eat strawberries* - jes. *Likes eating strawberries* - ne.

Policanoj trinkas kafon: *police officers drink coffee* - jes. *Policemen drink coffee* - ne. (!! Ĉu influas ankaŭ Duolingo la Trumpaĉo??)

Manĝas ĉokoladon: *eat chocolate* - jes. *Eat a chocolate* - ne.

The plates are made of paper: La teleroj estas el papero- jes. Estas faritaj el papero .ne.

La Japanoj: *the Japanese people* - jes. *The Japanese* - ne. Sed. Francaj homoj ili tradukas *The French!* *Chinese people*: Ĉinoj - jes, sed ĉinaj homoj - ne.

Mi ankaŭ trovis novan vorton: mojosa. *Esperanto is a cool language* -mojosa lingvo! Ĉu iu scias la devenon? Ĉu neologismo?

Entute mi ŝatas ludi per Duolingo. Mi ankaŭ refreŝigas mian scipovon de la indonezia per ĝi. La stranga formacio de reguloj (por ne diri manko de reguloj) kaj la familiaraj, kutimaj esprimoj (*colloquialisms*) faras lerni tiun lingvon koŝmaro, kompare kun lerni Esperanton.

Vera Payne.



3ZZZ

En la elsendo de la 9a de marto pro la proksimeco al la Tago de Virinoj aŭdeblas informoj pri la situacio de virinoj kaj pri rimedoj cele plibonigi tiun situacion. Aŭdeblas ankaŭ intervjuo al Sandor Horvath pri la fajroj en Aŭstralio . Por

la vojaĝemuloj estas ankaŭ informoj pri diversaj transportiloj **Franciska Toubale**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



AEA-estrarkunveno – 2020-03-20

Partoprenis Sandor, Jonathan, Indrani, Terry, Heather, Bradley, kaj Ivan.



2021 KONGRESO/KURSARO EN SIDNEJO

NZ kunvenos por diskuti ĉu 2021 estos komuna kongreso.

Ĉu kune dividi la kostojn/profitojn. La kongreso en Aŭklando iomete profitis.

Eblaj instruistoj: Ni ricevis respondojn de Bertilo, Katalin kaj Istvan pri ebla instruado. Ni daŭrigos la diskuton

ALIAJ AFEROJ

- ESK Andrew Woods aranĝis la gazeton kaj ĝi baldaŭ estos dissendita. Sendu artikolojn por la Junia eldono al esk@esperanto.org.au
- Arĥivo Skanilo por la Arĥivo. Kosto ĉirkaŭ \$742 inklusive liverado. ET 16 plus. Jonathan enketas. La estraranoj konsideras la prilaboron de la arĥivo valora. Skanado de foto ne tre bona sed por dokumentoj, libroj estas bona.
- Vintra kursaro en 6-7an de Junio en Adelajdo. Ĉu aliaj eventoj okazos en tiu tempo en aliaj ŝtatoj por interŝanĝi skajpe programerojn. Konsideru.

Venonta kunveno 19an de Marto.

Sandor Horvath



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Beleco en mia ĝardeno.

MIA ĜARDENO .

En mia ĝardeno nun floras la aŭtunflorantaj plantoj. Cetere Melburno dum la ĵusaj jaroj ricevis mildajn vintrojn kaj mildajn somerojn kun sufiĉe da pluvo: pli da pluvo ol la oriento de Gippsland, kiu duone forbrulis. Ankaŭ la printempoj kaj la aŭtunoj nuntempe estas mildaj, kun pluraj malvarmaj tagoj pro la ventoj venantaj el de la Suda Poluso.

Marcel.

LINGVOBELECO EN ESPERANTO .

Antaŭ pluraj jaroj mi kolektis, en la literaturo de Esperanto, ekzemplojn de bonega stilo. Mi ĉi sube reproduktas la pecojn por ke ankaŭ la legantoj de A.E. povu ĝui iln kaj eventuale imiti ilin. Jen ili estas. Mi ne donas la nomojn de la aŭtoroj, ĉar tio influus vin pri via admiro.

a). Tie similaj kamparanoj vivis feliĉe sian laborplenan estadon. La sola nubeto sur blanka fono de ilia horizonto estis la ĝendarmo *Dusabre*, timinda reprezentanto del' leĝoj,

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



kiu antaŭ kelkaj monatoj alvenis en tiu trankvila regiono. Li loĝis en proksima vilaĝo, sed ofte vizitis Bique-la-Crotte, kaj tiam pluvis protokoloj sur ĉiujn kapojn, plej ofte pro sensignifaj bagateloj: jen, ĉar la hundo de Mangin perdis sian impostomarkon; jen, ĉar antaŭ la domo de Dubois la defluejo estis ŝtopita de amasiĝinta koto; jen, ĉar la kokinoj de Rondel saltis en la legomojn de avara najbarino; jen, ĉar sur la veturilo de Ganumet lia nomo ne plu estis legebla; jen, ĉar la plugilo de Cantal staris meze de la vojo, kaj tiel plu.

Dusabre, tiu terura ĝendarmo, inspektis la vilaĝon en neregulaj interspacoj. Sur sia biciklo li alvenis senaverte kiel aprila pluvo kaj malbonhumora kiel ĝi.

b). La unua sunradio de la mateno estis ĵus enfluginta la ĉambron, kiam Abd-el-Hamid vekigis. Rimarkinte la orluman trabon kaj ĝian desegnon sur la nuda planko, li tuj leviĝis kaj fermis la kradŝirmilon de la fenestro: somere en Egiptujo estas necese konservi malvarmeta la aeron en la domoj, elŝlosante la sunlumon kaj la varmegan aeron de ekstere.

Vestite en noktoĉemizo, kaj sen sia fezo, Abd el-Hamid aspektis pli maljuna ol dum la tago en siaj belaj eŭropanaj vestoj, kiam la fezo kaŝis lian kalvecon. Vidiĝis ankaŭ pli klare la senkarnaj kruroj kaj la osteca brusto; kaj ĉi-hore liaj grizaj lipharoj estis iom senordaj, kaj tio akcentis la perpleksan esprimon sur lia bruna vizaĝo. Tamen, liaj okuloj estis brilaj, kaj vidigis lian emon sin kroĉi al la vivo tiom, kiom al siaj moneroj.

c). La vilao ne estis tute neloĝata. Almenaŭ ŝajnis, ke oni kutime vizitas ĝin ankaŭ nun kelkfoje. Iom da malordo, iom da hejmeco atestis, ke oni estis en ĝi antaŭ kelkaj tagoj. Sur la tablo kuŝis malfermita libro kaj tio iomete ektimigis ilin ke la posedanto de la vilao revenos. Pripensu, kia skandalo estus. Sed la viro tuj poste kun infana ĝojo malkaŝis la rezultojn de sia privatdetektiva esplorado: en la tuta domo troviĝis nur sabataj kaj dimanĉaj gazetoj. La posedanto do estas tiaspeca obstina semajnfino, kiun eĉ la malfrua aŭtuno ne fortimigas de la lagbordo. Kurioze, sed ili dum la tuta tempo ne pensis pri respondeco, ili nur ne volis esti malkovritaj. Sed cetere tute ne estis en iliaj pensoj eĉ penteto pro io kontraŭkutima, aŭ kontraŭrajta. Ĉio devis esti tiel kaj okazis, kiel tio devis okazi. La juĝisto same ne pensis pri io alia, kiel la knabino ne. Ili tute forŝiriĝis de la homa socio, en la tuta tero ekzistis nur du homoj: ili.

ĉ). Dio bona, kiel fervore tiu bastono draŝas mian skeletan spinon. De la opala tagiĝo ĝi superŝutas min per obstina timpanado. Ĉu ĝi prenis mian pelvon por nerompebla gongo?

Mi ja agnoskas, ke mi estas nur malnova azenaĉo, kiu urĝe bezonas riparon, sed kiu tamen meritis pli da estimo pro longedaŭra servuto. Ĉi matene mi aŭdis viron fluŝtranta pri mizerulo: "Li spertas hundan vivon. Se tiu kreteno scius, kio estas vivo de azeno! Sed ve-ĝemi ne mieligos mian faton. Amiko, samvoju kun mi ĝis la bazono, kie mia kruela mastro vendos siajn fabetojn.se mi ĝin atingos. Babilante mi forgesos mian nigran sorton.

Antaŭ longlonge, dek jaroj eble, mi naskiĝis en la palmaro de Colomb-Bechar, iun koralan aŭroron, inter florplena oleandro kaj bedo el hirtaj kardoj. En tiu virgilia lulilo kaŝe sidis duobla aŭguro, kiu sigelis mian destinon. Mi estis rava hufuleto, la ĝojo de la ĝardeno, la trezoro de mia panjo.

Notu ke, kontraŭe al la unuaj tri verkistoj, la lasta uzas multajn nenecesajn neologismojn.

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE